

## STAMPA Siegfried

<b>La malriĉeco en Afriko</b>	51
<i>Die armoede in Afrika</i>	50

## SUDHAUS Walter &amp; NEUHAUS Birger

<b>Kunevoluado de mamulparazitaj strongiledoj kaj iliaj hufulaj gastigantoj</b>	55
<i>Koevolution säugetierparasitischer Strongyliden und ihrer Huftierwirte</i>	54

## LINK Marion

<b>Ancilostomo, <i>Agriostomum sp.</i>, en la dika intesto de sia antilopa gastiganto</b>	61
<i>A hookworm, <i>Agriostomum sp.</i>, in the large intestines of its antelope host</i>	60

## WOYDA Nadine

<b>Filogenezo de la trifostrongiledoj (<i>Nematoda</i>)</b>	67
<i>Phylogeny of the Trichostrongylidae (Nematoda)</i>	66

## Scienca eĥo

Ruĝo - plej grava koloro de la prahomo / Kontikia truko / Ne hontu, dormemuloj! / Ovoformaj ovoĵoj / La plej aĝaj arboj	71
	72

## Redakta noto

Tiu ĉi SR-kajero n-ro 200 estas festkajero – kaj pro la fiera numero 200 kaj memore al "Internacia Scienca Revuo", kiu fondiĝis en 1904, antaŭ 100 jaroj. La nuna asocia organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) "Scienca Revuo" ne arogas al si esti senpera posteulo de la tiama unua scienca periodaĵo en Esperanto, kiu ĉesis aperi jam en 1911, post 8 jaroj da ekzisto. Sed ni danke memoras ties fondintojn, kiuj fosis la grundon kaj enmetis la semon por la nunaj sciencaj periodaĵoj esperantlingvaj.

Sed ĉu kreigo de unulingva internacilingva scienca revuo antaŭ cent jaroj estu festenda per eldono de "dulingva festkajero"? Ĝi fakte ne estas dulingva sed enhavas, krom Esperanto, ok naciajn lingvojn, ĉiam samtekste kaj paralele al la Internacia Lingvo. Mi dankas al la dekdoo da aŭtoroj, kiuj pozitive reagis al mia peto en la pasintaj "redaktaj notoj" kaj prenis sur sin la penon, esceptokaze verki artikolon "en du lingvoj".

Kial enmeti la nacian lingvon de aŭtoro? Nu, por memorigi, ke ankaŭ en lingvoj, kiuj ne apartenas al la "grandaj lingvoj" kaj kiujn ni devige devas lerni en la lernejo, estas publikigataj sciencaj kaj alispecaj artikoloj. Ke ekzistas multaj malgrandaj lingvoj, kiujn oni ofte forgesas en la unuiginta

Eŭropo, spite de la bona (ĉu ankaŭ sincera?) konsilo de politikistoj: "Lernu la lingvon de via najbara lando, ĉar per tio vi plej bone kontribuos al interpopola unueco kaj interkompreniĝo". Baze tio ja veras, sed kiu en Eŭropo lernas la danan, la nederlandan, la hungaran pro najbareco?

Ekzistas landoj, kie fakaj periodaĵoj estas eldonataj en la nacia (malgranda) kaj en "internacia" angla lingvo (tamen nacia). Jes, ankaŭ tio kontribuos al unueco kaj interkompreniĝo, sed estas tre grava diferenco inter tiu solvo kaj la dulingveco pere de Esperanto.

Ni praktiku tiun diferencon kaj imagu al ni la unuopajn sekvajn kontribuojn nacilingvaj kun anglalingva ekvivalento: do, ne restos la nuna versio dana/Esperanto, nederlanda/Esperanto, hungara/Esperanto k.t.p. sed ĝin anstataŭas sur la nepara paĝonombro (dekstre) la "internacilingva" angla formo, do: dana/angla, nederlanda/angla, hungara/angla kaj tiel plu, valida por ĉiuj sekvaj artikoloj. Tio ŝajnas en ordo kaj egalrajta. Sed egalrajta tio estas nur por kelkaj lingvoj. Oni ja devas demandi, kio poste okazos kun la artikolo de *Cumberlidge* kaj kun la sciindaĵoj de la du studentinoj *Link* kaj *Woyda*, kiuj publikigis sciencajn progres-raporton ne en la gepatra, sed en la "scienc-internacia" angla lingvo? (... ĉar aliflanke la publikigaĵo ne utilas por estonta "scienca kariero"...): aperos sur la maldekstra (nacilingva) tekstaĵo la angla versio kaj sur la dekstra ("internacilingva") paĝo denove la anglalingva teksto. Se presita dulingveco en nia rapidviva kaj ekonomiceca epoko estas perdo de tempo kaj plialtigo de preskostoj – nu, dufoje la samlingva versio de angla/angla vere estus frenezaĵo.

Nenion kontraŭ la angla, sed kun Esperanto kiel lingva rimedo por eŭropvasta kaj mondovasta dulingveco, tiuspeca frenezaĵo ne eblas. Ne estas la angla lingvo, kiu kreas la problemon, sed estas la sistemo, kiu kulpas. Iam estonte la scienco kaj la politiko vidos kaj perceptos, ke ekzistas funkcia alternativa por eviti tiuspecan sistem-eraron en unuiginta Eŭropo.

Tiu ĉi esceptokaze "dulingva" SR-kajero montras, kiel vera dulingveco funkcias: samrajta nacia lingvo paralele al samrajta internacia lingvo, unu apud la alia, pace, flankon ĉe flanko. Kaj la estontaj kajeroj de Scienca Revuo ree montras, kiel en la praktiko devas aspekti fakaj periodaĵoj por atingi plian disvastiĝon ol nur en la propra nacilingva kaj anglalingva medio: pere de la vere neŭtrala kaj interkompreniĝa, internacia kaj interscienca lingvo Esperanto.

Mi salutas vin kaj deziras plezuron dum komparo de la nacilingvaj kaj internacilingvaj tekstoj. Kaj restu fidela al Esperanto, kiu samatempe kaj samgrade gardas la mondan multlingvecon kaj solvas la problemojn de lingva egalrajteco kaj scienca interkomunikaĵo.